4-a Jaro. N-o 171 APERAS SEMAJNE 12. Januaro 1928



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanty | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

Alilanda Delegitaro Esperantista en Sovetio

23 Esperantistoj el 12 landoj partoprenis la solenan festadon okaze de la 10-jara jubileo de Oktobra Revolucio

Antaŭ 10 jaroj, la 7-an de novembro (24-an de oktobro malnovkalendare) 1917, okazis io, pri kio multaj personoj, de filistroj ĝis eminentaj politikistoj, parolis tiel: — "Okazis nekredeble eksterordinara politika kuriozaĵo: la bolŝevistoj, laboristoj en ĉifonoj, kamparanoj en bastoŝuoj, malpuraj soldatoj — uzurpis politikan potencon en la grandega ŝtato! Eksterordinara kuriozaĵo, kiu kompreneble povas daŭri ne pli ol du semajnojn . . . Jes, jes, sendube, la bolŝevistoj krevos ne pli malfrue, ol post du semajnoj . . ."

Sed pasis du semajnoj, poste du monatoj, du jaroj . . .

Pasis 10 jaroj!

Elĉerpiĝis la profetemo de ĉiuj kontraŭrevoluciaj profetemuloj.

Kaj jam la milionoj de Laborularo Sovetia estas solene festintaj sian grandan jubileon: la unuan jardekon de Oktobro.

Al sia festo ili invitis multan alilandan gastaron: ĉ. 1000 delegitoj el 47 landoj de la mondo venis Sovetunion por partopreni la solenan feston.

Ne reĝoj, ne princoj, ne magnatoj kapitalistaj aŭ aliaj grandmoŝtoj feliĉigis la grandan feston per sia vizito el fremdaj landoj.

Ne ili venis.

Simplaj laboristoj, ruĝfrontbatalantoj, kamparanoj, progresemaj intelektagantoj — jen kiu estis dezirita gasto de la internacia proletara festo.

Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU) estis unu el la proletaraj organizoj, al kiuj estis prezentita la honora rajto inviti siajn gastojn al la tutunia Oktobra festo. Kaj ĝi invitis 12 esperantistojn el 9 landoj (Francio, Germanio, Britio, Svedio, Norvegio, Aŭstrio, Latvio, Estonio, Finnlando). Bedaŭrinde 1 K-do ne povis alveni kaj venis nur 11 K-doj: 4 komunistoj, 4 socialdemokratoj kaj 3 senpartiuloj (5 laboristoj, 5 oficistoj, 1 studento).

Sed, anstataŭ la mankinta K-do, pro la disvastiĝo de esperanto, inter la aliaj diversaj delegitaroj troviĝis ankoraŭ 12 esperantistoj el 8 landoj (Germanio, Aŭstrio, Latvio, Norvegio, Britio, Belgio, Japanio, Sud-Afriko). Sume do la Oktobran festadon partoprenis 23 esperantistoj el 12 diversaj landoj. Kun granda kontento ni konstatas tiun ĉi fakton.

La ŝtato de Laboristaro oficiale akceptis inter la gastoj ĉe sia plej alta festo la delegitaron de alilandaj esperantistoj. Do ne vane pasis 40 jaroj da esperantomovado! Do ne vane pasis la sesjara laboro de SAT!

Antaŭ tiu ĉi grava fakto ekŝajnas esti malŝatindaj ĉiuj niaj ĝishodiaŭaj sukcesoj. Kaj tiu ĉi fakto verŝas en nin pli da nova energio, da nova kuraĝo, da nova forto por la plua laboro, por la bono de la tutmonda Proletaro.



Esperantista Delegitaro ĉe la Oktobro-festoj en Sovetio
Sidas de maldekstre Gek-doj: O. Bässler (Germanio), F. Sons (Britio), G. Salan (Francio), R. Marthinsen (Norvegio), E. Adamson (Svedio), A. Krastin (Latvio), A. Lundström (Finnlando), M. Klein (Aŭstrio), H. Hempel (Germanio), kaj R. Lerchner (Germanio).
Staras K-doj: J. Lidin kaj V. Ĵavoronkov (Moskvo).

Kun la esperanto-delegitaro tra Sovetio

La delegitaro esperantista ĉe la Oktobra festo en Sovetunio konsistis el *sekvantaj Gekamaradoj:* Einar Adamson (Svedio), Otto Bässler, Hugo Hempel kaj Richard Lerchner (Germanio), Georges Salan (Francio), Antonio Krastin (Latvio), Martin Klein (Aŭstrio), Frederik Sons (Britio), Arne Lundström, (Finnlando), Rosa Marthinsen (Norvegio), A. Kirikal (Estonio). Krom ili, en la konsisto de aliaj delegitaroj estis es-

perantistoj: 3 K-doj el Germanio, 1 el Aŭstrio, 1 el Latvio, 1 el Norvegio, 2 el Belgio, 2 el Japanio (Uĵaku Akita kaj Kvandzo Nalmi), 1 K-dino el Britio (M. Dunn), kaj 1 K-do el Sud-Afriko (negro). Entute: 23 Gek-doj el 12 landoj.

Alveno de la invititaj esperantistoj komenciĝis la 28-an de oktobro kaj la foriro — la 19-an de novembro. Lasta gasto forveturis eksterlanden la 8-an de decembro (escepte de unu K-do, kiu restis ankoraŭ pli longe.)

Dum la restado de la gastoj okazis *4 radiodisaŭdigoj* en esperanto el Moskva Centra Radio-Telefona Stacio "Komintern", kiujn partoprenis preskaŭ ĉiuj esperantistaj delegitoj. Jam estas ricevitaj informoj: el Danio, kie oni kun aparta plezuro aŭskultis la paroladon de japana K-do, kaj el Göteborg (Svedio), kie la parolado de sveda esperantisto estis sekvintatage presita en la loka gazeto.

La gastoj-esperantistoj *vizitis sekvantajn urbojn:* Leningrad, Tverj, Moskva, Smolensk, Minsk, Kiev, Ĥarkov kaj Naro-Fominsk (urbeto apud Moskva). Ĉie okazis multaj ekskursoj kaj vizitoj al diversaj institucioj, fabrikoj ktp. En Kiev okazis la 5-a radiodisaŭdigo en esperanto. Du K-doj vizitis ankaŭ Rostov-Don, Mahaĉ-Kala, Baku, Tiflis, Batum, Poti, Gagri kaj Novorossijsk.

En Moskvo la esp-aj delegitoj partoprenis du kunvenojn de *Moskva esperantistaro* kaj unuigitan kunsidon de Centra kaj Moskva Komitatoj de SEU. La esp-a delegitaro aktive partoprenis la *Mondkongreson de l' amikoj de Sovetunio,* kie ĝi kolektis 250 subskribojn sub la deziresprimo pri akcepto de esperanto. Tiu ĉi fakto atestas grandan intereson al esperanto inter la kongresanaro.

Okazis la 6-an de novembro *internacia konferenco por laborista korespondado* per esperanto. La 7-an de novembro la tuta delegitaro ĉeestis la paradon de Moskva Laborularo sur *Ruĝa Placo* antaŭ la maŭzoleo de Lenin. La esp-aj delegitoj vizitis la redaktejojn de la ĵurnaloj "*Raboĉaja Gazeta*" kaj "*Izvestija CIK SSSR*". La ambaŭ redaktejoj konsentis apliki esperanton por la korespondaĵoj: la unua deziras ricevi artikoletojn kaj informojn pri la vivo de alilandaj laboristoj, vivo en diversaj landoj. Oni skribu, adresante: Moskvo (USSR) — al la nomitaj ĵurnaloj.

La esp-a delegitaro partoprenis *kunvenon de laboristaj korespondantoj* ĉe klubo de la ĵurnalo "Pravda". Raportinto pri la problemo de internacia laborista korespondado K-do Iĥok rimarkigis, ke la vivo mem progresigis du vojojn de la internacia lab-ista korespondado: esperanton kaj foto-korespondadon. *La gastoj vizitis fabrikojn,* kazernojn de la Ruĝa Armeo, klubojn, instituciojn, teatrojn, infanejojn, malsanulejojn ktp. Dum la Kongreso de l' amikoj de Sovetunio la esperanto-delegitaro estis kinematografita en aparta grupo.

En bankedo, aranĝita de Moskva Soveto por honorigo la gastojn, la prezidanto de la Popolkomisario K-do R i k o v kaj la popolkomisaro por klerigo K-do *Lunaĉarskij* toastis: "Vivu Esperanto!"

La gastoj vizitis Centran Komitaton de la *Sindikato de PTT-laboristoj,* kie interalie oni permesis akceli, ke sur la resendataj poŝtaĵoj klarigo pri la kaŭzo de resendo estu farata en esperanto. En ĉiuj vizitoj la esp-aj delegitoj *uzis esperanton.* Estis farita tre grava kaj serioza propagando por esperanto kaj SAT.

De la poli-sovetia limpunkto Negoreloe la esp-aj delegitoj, revenante hejmen, sendis adiaŭ-leteron al CK SEU: "Transirante la sovetian limon, la Delegitaro esperantista ankoraŭ unu fojon esprimas sinceran dankon por via invito. Vivu nia komuna laboro kaj venko!"

Internacia Konferenco pri Laborista Korespondado

en Moskvo, la 6-an de novembro 1927

La Internacia Konferenco pri Laborista Korespondado malfermiĝis en Moskvo en la ejo de Teknikumo por Interkomunikado la 6-an de novembro 1927 — en la antaŭtago de la 10-jara jubileo de Oktobra Revolucio. La konferencon ĉeestis proksimume 50 partoprenantoj el 10 diversaj landoj (Germanio, Britio, Svedio, Norvegio, Finnlando, Latvio, Aŭstrio, Japanio, Francio kaj Sovetunio).

Iniciatita de Sovetrespublikara Esperantista Unio, la konferenco estis tute dediĉita al la problemoj de l' internacia laborista korespondado per esperanto.

Kiel prezidanto de la konferenco estis elektita K-do B ä s s l e r (Germanio) kaj kiel sekretario — K-do N. N e k r a s o v (Sovetunio).

Unua raporto estis farita de K-do E. D r e z e n (Sovetunio) pri la ĉefaj taskoj de l' ekzistantaj laboristaj esperanto-asocioj rilate al la organizado de l' internacia laborista interproksimiĝo.

Duan raporton faris K-do O. B ä s s l e r (Germanio), kiu rakontis pri la agado de *Esperanto-Servo* de SAT en Leipzig. Li atentigis pri diversaj mankoj en la laboro por laborista informado kaj korespondado per esperanto, aparte akcentinte oftan nerespondadon de diversaj K-doj je senditaj al ili demandoj. Tiuj ĉi nerespondado kaj malakurateco estas la plej pereigaj por la laboro.

Pri la raporto de K-do B ä s s l e r okazis vigla diskutado.

K-do R. L e r c h n e r (Germanio) subtenis la raportinton en la demando pri nerespondado kaj proponis plej energie kontraŭbatali tiun ĉi plej malbonan danĝeron en la afero.

K-do B. P e r e l ŝ t e j n (Sovetio) informis la konferencon pri kelkaj gravaj sukcesoj de laborista esperanto-korespondado inter la presistoj. Li alvokis imiti la ekzemplon de la presistoj ankaŭ en la aliaj regionoj de la vivo.

K-do A. K r a s t i n (Latvio) rakontis malgrandan fakton, kiu estas tamen tre pripensinda: *Latvia Laborista Esperanto-Asocio* en Riga dissendis al diversaj landoj peton komuniki tradukon de la devizo "Proletoj el ĉiuj landoj unuiĝu" en koncernaj naciaj lingvoj. Malgraŭ bagateleco de la peto, preskaŭ neniu respondo estis ricevita. Oni nepre devas trovi ian rimedon por evitigi tiajn malbonaĵojn.

K-do E. A d a m s o n (Svedio) klarigis, ke tre ofte kaŭzo de nerespondo estas, ke la demandinto nelegeble skribis sian adreson aŭ eĉ tute forgesis ĝin noti. Tiaj okazoj estas tre oftaj. Sekve oni devas esti pli atentemaj. Malgraŭ tio oni ne devas tro malmulte taksi la grandajn sukcesojn, kiujn akiris la internacia laborista korespondado per esperanto kaj speciale la laborista korespondado por la gazetoj. Eĉ burĝa gazetaro nun ekimitas la uzon de esperanto por havi korespondaĵojn el aliaj landoj.

Respondante al la diskutintoj, K-do O. B ä s s l e r diris, ke necesas dispartigi la individuan korespondadon de la kolektiva. Por la individuoj sufiĉas la koresponda fako en *Sennaciulo:* tie ili serĉu mem dezirindajn korespondantojn al si. La *Esperanto-Servo* de SAT povas prizorgi nur korespondpetojn kolektivajn. En la laboro ne necesas propagandi esperanton: oni ne facile interesiĝas pri esperanto mem. Kontraŭe, nur la praktika rezulto interesigas pri esperanto.

Plue sekvis la tria raporto, tiu de K-do G. D e m i d j u k (Sovetio) pri la praktika aplikado de esperanto en la teknikaj organoj. Li citis la pedagogian gazeton "La Vojo de Klerigo" kaj la radioteknikan "Radio-Amatoro", kiuj eldonas resumojn esperanto-lingvajn. Nur praktika aplikado de esperanto ebligos vastigi la movadon. La movado kreskos ne, ĉar esperanto estas bela kaj bona, sed ĉar ĝi estas praktike utila. En la regiono de fakaplikado esperanto devas esti pli energie antaŭenpuŝita. Devas ekekzisti esperantistoj-scienculoj, esperantistoj-inĝenieroj, kiuj laborus en sia fako per esperanto. Tiel ankaŭ ebliĝus la kultura kaj intelekta kontakto inter Sovetio kaj aliaj landoj — per esperanto.

La raporto de K-do G. D e m i d j u k estis akceptita sendiskute.

K-do E. A d a m s o n (Svedio) parolis pri la grava signifo de korespondado

inter la sovetiaj ruĝarmeanoj kaj alilandaj soldatoj. Tia korespondado kaj senpera interligo de la ruĝarmeanoj kun laboristoj tutmondaj estas plej bona garantio por neniigo de la opinio pri Sovetio kaj Ruĝa Armeo, kiu estas disvastigata en Okcidento de la burĝaro.

La própono de K-do Adamson sendi tiusencan saluton al la Ruĝa Armeo estis akceptita de la konferenco.

Sekvis raporto de K-do V. Ĵavoronkov (Sovetio) pri la esperantaj radiodisaŭdigoj el Sovetio, kiuj estas grava faktoro de la kontakto inter Sovetio kun la alilando.

Transirinte al la sekvanta punkto de la tagordo, la konferenco pridiskutis la raporton de K-do E. Adamson (Svedio), kiu informis pri la okazonta VIII-a kongreso de SAT en Göteborg (Svedio) en 1928. Estas esperataj subvencio de la urbestraro, senpaga loĝejo. Estas projektataj ekspozicio, ekskurso al Leningrado ktp.

Diversaj demandoj, faritaj de kelkaj K-doj al K-do Adamson pri la kondiĉoj de la vojaĝo, estis de li responditaj. Aparte K-do R. Lerchner (Germanio), memorigante pri la sperto de la antaŭaj kongresoj, rekomendis plej frue



Internacia Konferenco pri Laborista Korespondado
en Moskvo, la 6-an de novembro 1927

Supre: Ĵavoronkov, Salan. — Staras: Lerchner, Lundström, Krastin, Drezen, Bässler, Nekrasov, Lidin, Demidĵuk, Incertov, Januŝevskij. — Sidas ĉe la tablo: Klein, Adamson, Akita, Marthinsen, Hempel, Zimmermann, Nalmi, Sons. Kaj aliaj.

K-do M. Klein (Aŭstrio), aprobante tiujn ĉi radiodisaŭdigojn, proponis elekti pli taŭgan tempon por pliebligi la aŭskultadon en alilando, ĉar longa ondo dum tago ne estas aŭdebla.

K-do H. Hempel (Germanio) subtenis K-don Klein, citante la fakton, kiam ili sensukcese provis aŭskulti la esp. radio-disaŭdigojn el Moskvo.

K-do N. Nekrasov (Sovetio) klarigis, ke la citita de K-do Hempel malsukceso okazis ne pro maloportuna tempo, sed pro malhelpo farita de radiostacio germana.

K-do V. Ĵavoronkov informis, ke la esp. radiodisaŭdigoj el Moskvo estas kutime tre bone aŭskultataj en multaj landoj ĝis Francio, Palestino, eĉ Afriko. La esp. disaŭdigoj, kiuj okazas ĉiulunde je la 22.30 h. MET per la ondolongo 1450 metroj el la Moskva Centra Radio-Telefona Stacio "Komintern", estas tute oportunaj. Ankaŭ disaŭdigoj per mallongaj ondoj estas baldaŭ organizotaj.

diskonigi ĉiujn kondiĉojn de la kongreso en plej detala maniero. K-do N. Nekrasov konsilis eldoni kongreslibreton.

Sekvis akceptado de la rezolucioj pri ĉiuj aŭskultitaj raportoj. Ĉiuj rezolucioj estis aprobitaj unuanime (Legu ĉi-sube).

Ĉe la finiĝo la konferenco estis informita pri la okazonta Mondkongreso de l'Amikoj de Sovetio. Estis farita propono prezenti al la Kongreso proponon akcepti esperanton por plifaciligi la kultur-rilatojn inter Sovetio kaj alilando[1].

Post danksaluto de K-do A. Dmitriev, farita en la nomo de la esp-a grupo ĉe la Teknikumo por Interkomunikado, en kies ejo okazis la konferenco, K-do O. Bässler anoncis la konferencon fermita.

---

[1]) La Mondkongreso de l' Amikoj de Sovetio okazis en Moskvo 10.—12. novembro 1927. — 250 kongresanoj el 26 diversaj landoj subskribis la deklaron pri utiligo de esperanto en la kultur-rilatoj inter Sovetio kaj aliaj landoj.

Rezolucioj ĉe la Konferenco

I. Rezolucio pri ĝenerala direkto de la agado de laboristaj esperanto-asocioj

La konferenco salutas SAT kaj la landajn laboristajn asociojn, konstatante, ke dum la jaroj pasintaj la movado por kaj per-esperanta inter la Laboristaro kreskis rimarkinde. Tiu natura kreskado de la movado, plene konforma al la venonta rolo de la Proletaro tutmonda, estis ankoraŭ rapidigita per laŭcela organizo de la ekzistanta laborista esperanta movado. SAT kaj la naciaj Asocioj, memstare laborantaj en siaj kampoj, sukcesis reciproke en plej bona maniero subteni unu la aliajn, — konservante la necesan unuecon de siaj labor- kaj batal-metodoj.

La konferenco instigas, ke SAT laŭeble pli aktive intervenu ĉe diverstendencaj Asocioj kaj Internacioj laboristaj — por ke ili esploru la problemon pri lingvo internacia kaj akceptu ĝian praktikan uzon. Estante certa, ke en la proksima estonto SAT faros gravan kaj utilan laboron por la tutmonda unuecigo de la Laboristaro kaj por altigo de ĝia kulturnivelo, — la konferenco alvokas ĉiujn klaskonsciajn esperantistojn laŭeble aktive partopreni en la laboro de SAT.

Same — konstatante neeviteblan organizan kaj moralan dekadencon de la neŭtrala (burĝa) esperanto-movado, — la konferenco instigas ĉiujn verajn kaj sincerajn esperantistojn laŭeble helpi, ne pretendante pri iu gvida rolo, la kreskon kaj progreson de esperanto en la laboristaj amasoj. Nur inter tiuj amasoj kaj nur kun ili povos esti realigita la bela espero pri starigo de universala lingva interkomprenilo.

II. Rezolucio pri organizo kaj pri pliintensigo de la internacia laborista esperanto-korespondado

La konferenco notas la grandajn servojn, kiujn faras esperanto en la servo de tutmonda interkompreniĝo de la proletoj. Ĝi danke notas, ke la informa servo de SAT bone sukcesis kaj multe utilis. Ĝi instigas, ke ankaŭ plej diversaj Asocioj kaj Internacioj laboristaj, — unuavice esperantistaj, — laŭeble organizu similajn informo-servojn, kiuj povus servi por reciproka interŝanĝado de abunda aktuala inform-materialo.

Konstatante, ke la problemo pri plej bonaj metodoj de gvidado kaj de organizado de internacia laborista korespondado, ĉu per helpo de informo-servo, ĉu senpere inter apartaj ĉeloj kaj izoluloj, estas ankoraŭ tro nova kaj malmulte esplorita, — la konferenco insistas, ke CK de SEU intervenu ĉe Profintern, (Tutsovetia Centra Konsilantaro de la Profesiaj Sindikatoj) kaj aliaj koncernaj institucioj pri kunvoko dum la jaro 1928 en Moskvo aŭ Leningrad de speciala internacia konferenco de "Labinkoroj". La naciaj laboristaj asocioj esperantistaj

kaj la praktikaj laborantoj en tiu kampo devas jam nun kolekti materialojn kaj prepari sin por tiu konferenco, por ke ĝi sukcesu montri la ĝustan vojon irotan de ni tiurilaten. Ĉar speciale grandan disvolvon la laborista internacia korespondado trovis en USSR, — la konferenco petas CK de SEU, ke ĝi preparu la raportojn kaj elektu la raportontojn pri: 1. internacia grup- kaj ĉel-korespondado kaj 2. pri internacia gazetservo kaj interŝanĝo.

Tiuj du punktoj devas ankaŭ esti la ĉefaj en la tagordo de la estonta konferenco.

III. Rezolucio pri utiligo de esperanto por reciproka kultura interligo de USSR kun eksterlando

La eventuala tasko preni en siajn manojn pluan progresigon de organizita esperanto-movado postulas, ke SAT kaj la laboristaj esperanto-asocioj, — propagandante kaj agitante en la rondoj laboristaj, — komencu samtempe vastigi sian laborkampon en fakoj teknikaj kaj specialaj. La situacio de USSR — ŝtato proleta-laborista, nun kontraŭstaranta al la landoj kapitalistaj — postulas, ke ĝuste la laboristaj rondoj esperantistaj laŭeble servu al firmigo de fakoj kaj kulturaj ligoj inter USSR kaj alilando. Tiakaŭze — la konferenco plezure notas la tendencon de Sovetiaj aŭtoritataj institucioj enigi esperanto-resumojn en la sovetia faka gazetaro kaj pliaktivigi la reciprokan peresperantan interŝanĝadon de la informoj kaj komunikoj inter asocioj kaj revuoj de USSR kaj alilando.

La konferenco alvokas ĉiujn laborulojn-esperantistojn — fakulojn — laŭeble subteni klopodojn tiurilatajn de SEU kaj servi tiamaniere al plej vasta penetro de esperanto en ĉiujn fakojn de moderna vivo same en USSR, kiel en la landoj kapitalistaj. Ĝuste per realigo de tiu faka uzo de esperanto — la sovetia esperanto-movado faros unu el la plej gravaj servoj al la ĝenerala esperanta-movado.

Noti tion, tion memori kaj tial subteni tiurilatajn klopodojn de SEU — devas do ĉiu sincera kaj sindona esperantisto, deziranta utilon kaj sukceson al sia lingvo.

IV. Rezolucio pri la okazonta VIII-a kongreso de SAT en Göteborg

La konferenco deziresprimas, ke la organiza komitato de la kongreso: a) laŭeble dum la kongreso aranĝu fakkunsidojn de sindikatanoj diversaj; b) klopodu ĉe la sovetiaj aŭtoritatoj por organizado de speciale postkongresa ekskurso per ŝipo al Leningrad, kiun povus partopreni dezirantaj reprezentantoj de SAT-rondoj kaj laboristaj esperantaj asocioj; c) zorgu ke la eventuala ekskurso okazu samtempe kun la internacia konferenco de "labinkoroj", kiu estu kunvokata tiuokaze en Leningrad.

V. Rezolucio pri Radio-Disaŭdigoj esperantaj el Sovetio

La konferenco danke konstatas grandan sukceson en eksterlando de sovetiaj esperanto-radio-disaŭdigoj kaj, notante, ke la eksterlandaj ŝtataj potencoj ĉiel klopodas ĝeni aŭskulton de tiuj radio-disaŭdigoj, petas, ke la Societo por Kultur-rilatoj inter Sovetio kaj alilando, la Societo "Radiotranslacio" kaj la Popolkomisario por Poŝto kaj Telegrafo zorgu pri pluaj regulaj esp. disaŭdigoj kaj pri pliaktualigo de ilia enhavo.

Sekretario de la konferenco: *N. Nekrasov.*

ESPERANTO ĈE LA MONDKONGRESO DE L' AMIKOJ DE SOVETIO

Inter la 10.—12. de novembro 1927 en Moskvo okazis Mondkongreso de l' Amikoj de Sovetio. La kongreson partoprenis preskaŭ 1 000 delegitoj el pli ol 40 diversaj landoj. La kongreso estis grandioza manifestacio de l' internacia solidareco kun Sovetio kaj de l' unueca fronto de progresemaj ĉiulandaj kulturlaborantoj por defendi Sovetion kontraŭ ĉiuj atakoj.

La Kongreson partoprenis ankaŭ esperantista delegitaro, konsistinta el 23 personoj el 12 landoj (Svedio, Germanio, Francio, Latvio, Aŭstrio, Britio, Norvegio, Estonio, Finnlando, Belgio, Japanio, Sud-Afriko). Dum la kongreso, laŭ la iniciato de l' esperantista Delegitaro, estis kolektita granda listo da subskriboj sub la sekvanta propono: "Konstatante la grandan malfacilecon kaj perdon de tempo, kiu okazas pro lingva diverseco dum interrilato de diversnaciaj reprezentantoj, dum tradukado de la paroladoj en ĉiu internacia kunveno, dum praktika disvastigo de inform-materialo unulingve preparita, — kaj observante, samtempe, ke estas bezonata unu certa helplingvo internacia por plifaciligo de la rilatoj inter Sovetio kaj alilando, kaj ke la lingvo esperanto malgraŭ sia nuna relative nesufiĉa disvastigiteco tamen jam liveras grandan utilon por internacia korespondado kaj kultura interkontaktiĝo, — ni, subskribintoj el diversaj landoj de la mondo, veninte por festi la 10-jaran jubileon de Oktobra Revolucio, proponas sekvantan deziresprimon:

a) celante plivastigon kaj pliprofundigon de la rilatoj inter Sovetio kaj alilando, estu rekomendata kaj allasata uzado de la lingvo internacia esperanto en leteroj, kunvenoj kaj aliaj okazoj, kiam aliaj lingvoj liveras embarason por interkompreniĝo; b) estu utiligata la helpo de la nun ekzistanta progresema esperanto-gazetaro kaj gruparo kiel peranto kaj ligilo por diskonigo de la informoj kaj artikoloj pri la vera stato en Sovetio kaj por organizo de kulturkontakto kun Sovetio, ĉu individua, ĉu kolektiva; c) la Societo por kulturkontakto inter Sovetio kaj alilando kune kun la koncernaj fak-asocioj kaj gazetoj zorgu pri starigo de regula esperanto-lingva informa kaj traduka servo tie, kie eblas tia aranĝo.

Tiu ĉi deziresprimo estis subskribita de 250 delegitoj el 27 diversaj landoj. Interalie la deziresprimon subskribis sekvantaj eminentaj personoj (bedaŭrinde multaj nomoj estas malfacile legeblaj):

1. **Francio** (67 personoj) — Autant Lara, Ed. Autant, André Colomer, Grandjouan, Bernardon, Cabrol, Chabrit, Bernard Lecache, Jacques Sadoul, Francis Jourdain, Léon Moussinac k. a. 2. **Germanio** (27 personoj) — Willi Münzenberg k. a. 3. **Svedio** (10 personoj). 4. **Britio** (49 personoj) — Sh. Saklatvala k. a. 5. **Belgio** (17 personoj). 6. **Aŭstrio** (8 personoj). 7. **Latvio** (5 personoj). 8. **Ĉeĥoslovakio** (5 personoj) — Dr. J. Bartoŝ k. a. 9. **Danio** (2 personoj). 10. **Estonio** (1 persono). 11. **Irlando** (8 personoj) — J. Larkin (filo) k. a. 12. **Holando** (3 personoj) — J. W. Krugh k. a. 13. **Usono** (11 personoj) — Joseph Morris k. a. 14. Finnlando (4 personoj). 15. **Meksikio** (2 personoj. 16. **Venezuelo** (1 persono). 17. **Kubo** (1 persono). 18. **Hindio** (2 personoj) — Suhasini Narutra, Lakshmi Trivandrum. 19. **Javo** (1 persono)—Disponegoro. 20. **Ĉinio** (5 personoj) — D. T. Hsing, H. S. Liaŭ (Ligo kontraŭ Imperiismo) k. a. 21. **Japanio** (1 persono) — Uĵaku Akita. 22. **Sirio** (1 persono) — Sénier Cherib Arslan. 23. **Maroko** (1 persono) — A. H. Mattar. 24. **Mongolio** (4 personoj). 25. **Norvegio** (11 personoj) — A. Oeberland k. a. 26. **Sierra Leone** (1 persono) — E. A. Richards. 27. **Sovetio** (2 personoj).

La deziresprimo estis transdonita al la Societo por kulturrilatoj inter Sovetio kaj alilando.

Alvoko de la Kongreso de l' Amikoj de Sovetio

Ni, reprezentantoj de laboristoj, kamparanoj, kooperacio kaj de popoloj el sub la imperialismaj jugoj, — ni, laborantoj sur la kampo de scienco, arto, pedagogio kaj kulturo, — ni, social-demokratoj, senpartiuloj, komunistoj kaj membroj de naci-revoluciaj partioj, — kolektiĝinte ĉe la kongreso de l' amikoj de USSR en Moskvo okaze de la 10-jara

datreveno de la granda Oktobra Revolucio, — ni opinias, ke estas nia devo rekte diri al la tuta mondo jenon:

Ni konsideras la militon kontraŭ Sovetio kiel hontindan kontraŭrevolucion, kiel grandegan krimon kontraŭ la laboranta homaro.

La milito kontraŭ Sovetio estas milito kontraŭ la laborista klaso kaj kamparanaro por la intereso de l' terposedantoj kaj kapitalistoj. La milito kontraŭ Sovetio estas krucmilitiro kontraŭ la socialismo por la intereso de l' kapitalismo.

La milito kontraŭ Sovetio signifas militon kontraŭ la laborularo tutmonda, signifas subtenon de la plej nigra internacia reakcio en ĝia akcelado: ekstermi la laboristan movadon en ĉiuj landoj kaj subpremi la emancipiĝan batalon de la jugitaj popoloj.

La milito kontraŭ la laborista ŝtato signifas la subtenon de la sistemo de la konstante revenantaj imperialistaj militoj, kiuj estos ĉiam pli kaj pli reakciaj, ĉiam pli monstraj, ĉiam pli ekstermantaj kaj kiuj minacas transformi en amasegon da ruinoj la dum jarmiloj aglomeriĝantajn konkeraĵojn de la tekniko, kulturo, scienco kaj arto.

Ni nin direktas al ĉiuj honestaj militkontraŭuloj, al ĉiuj laborantoj de fizika kaj intelekta laboro kun la alvoko ekkomenci senkompatan batalon kontraŭ la militpreparo kontraŭ Sovetio, samkiel ankaŭ kontraŭ ĉiaspeca atako kontraŭ la proletara diktaturo senkondiĉe el kie ajn irus tiu ĉi atako, de kiu ajn ĝi estus subtenata kaj per kiuj ajn ideologiaj devizoj ĝi estus ŝirmata.

La kongreso konstatas, ke la internacia situacio lastatempe treege pliakriĝis. La politiko de la grandaj imperialistaj ŝtatoj dum la postmilita periodo elmontris la ĝustan karakteron de ĉiuj frazoj pri "defendo de la patrolando", pri "justa milito", pri "lasta milito", pri "milito por libereco kaj progresado" ktp. Tiu ĉi politiko trovis sian esprimon en la malhonoraj rabkontraktoj (Brest - Litovsk, Versailles, Trianon, Saint-Germain, ktp.), en la ekstrema ekspluatado kaj en la aktoj de kruda perforteco en la kolonioj kaj en la respublikoj de Centra kaj Suda Ameriko, kies loĝantaro estas ekspluatata ankoraŭ pli forte ol antaŭe kaj krom tio estas submetata al barbaraj kaj hontindaj atakoj el la flanko de la imperialistoj, ĵus kiam atinginte politikan maturecon ĝi faras penon emancipiĝi de la despotoj (Egiptio, Hindio, Sirio, Maroko, Indonezio, Ĉinio ktp.).

La kongreso kondamnas tian konduton de la imperialistaj registaroj kaj decidas per ĉiuj fortoj defendi la jugitajn naciojn kaj unuavice la grandan ĉinan popolon, la popolon, kiu efektivigas heroecan lukton kontraŭ la unuigitaj fortoj de l' imperialistoj kaj feŭdo-burĝara kontraŭrevolucio, ekstermanta nun sub la standardo de Kuo-min-tang la plej bonajn fortojn de la ĉina emancip-batalo.

La kongreso konstatas, ke tiu ĉi politiko de la reganta kapitalista klaso neeviteble sekvigos post si konfliktojn inter la kapitalistaj ŝtatoj kaj ankaŭ senkompatan batalon kontraŭ la ŝtato de la proletara diktaturo. —

La kongreso plue konstatas, ke la regantaj klasoj de Britio, antaŭ cent jaroj, en komenco de la epoko de la eŭropaj burĝrevolucioj, starinte en la unuaj vicoj de kontraŭrevoluciaj koalicioj kontraŭ la revolucia Francio, nun denove estas la unuaj de "sankta alianco" preparanta la kapitalistajn ŝtatojn al la batalo kontraŭ la unua laborista respubliko.

La kontraktorompo inter la konservativa britia registaro kaj Sovetunio, la indignigaj perfortagoj, la abomenigaj mortekzekutoj de la revoluciaj herooj en Ĉinio, la postulo forvoki Sovetambasadoron el Francio, la persekutado de la proletara ŝtato per gazetaro, la teroragoj, la furioza progresado en militpreparo, la diplomata, financ-ekonomia blokado de Sovetio — ĉio ĉi indikas la danĝeron de ekatako kaj minaco al la ŝtato de la venintaj laboristoj.

La kongreso salutas la politikon de la paco, realigatan de Sovetunio, kaj deklaras, ke nur danke al la firma volo al la paco, evidentigita de la Sovet-registaro, milito ĝis nun ne okazis. La kongreso deklaras, ke ĉiu kapitalista registaro jam antaŭlonge ekprenus armilon, se ĝi submetiĝus al tiaj abomenigaj perfortagoj, kiajn toleris la organoj de la proletara ŝtato en Londono, Pekino, Ŝanĥajo, Parizo kaj Varsovio (mortigo de Vojkov).

La kongreso deklaras, ke la kredo de la laboristoj kaj kamparanoj de Sovetio, same kiel ankaŭ de la Ruĝa Armeo, pri la pacemo de ilia registaro kaj la neceso defendi la konkeraĵojn de la revolucio garantios mobilizon de la tuta Laborularo en Sovetunio, por sukcese efektivigi defendbatalon responde al la atako de ie ajn. —

La reprezentantoj de la laboristoj, de la laborkamparano, de la revoluciema inteligentularo, de la subpremitaj nacioj vokas al la kuraĝa subtenado de Sovetio kaj de la ĉina revolucio. Nur laŭsistema organiza kaj propaganda antaŭpreparo al amasa manifestado povas esti konsiderata kiel honesta batalo por la socialismo kaj por forigo de la kapitalistaj militoj.

La kongreso direktas sin al ĉiuj laboruloj, al ĉiuj sinceraj adeptoj de la paco kaj defendantoj de la kulturo kaj civilizacio kun la alvoko — *per ĉiuj rimedoj batali kontraŭ militpreparoj kaj kontraŭ militatencoj kontraŭ Sovetio.*

Laboruloj de fizika kaj intelekta laboro en ĉiuj landoj, konkorde batalu — *Kontraŭ la friponaj fortoj de la Kapitalo! Kontraŭ la barbaraj, imperialistaj militoj! Kontraŭ la imperialista perfortopolitiko en Ĉinio! Kontraŭ la sanga faŝismo! Kontraŭ la interveno al Sovetio! Batalu, defendu, gardu Sovetion, la patrolandon de la laboruloj, la bazon de la paco, la fajrujon de l' emancipiĝo, la fortikaĵon de la socialismo, per ĉiuj rimedoj, per ĉiuj manieroj!*



ATENTU SOVETIANOJ!

Por sensarĝigi la funkciadon de l' SAT-perejo ĉe CK. SEU, la Administracio de SAT kun ĉi-anonco ekfunkciigas kroman specialan

AGENTEJON DE SAT
por Suda Sovetio

(Ukrainio, Krimeo, Nord-Kaŭkazio, Transkaŭkazio)
Adreso: KREMENĈUG, "Esperanto".

La Gek-doj el suda parto de Sovetio bonvolu denun ĉian monon por SAT sendi al tiu agentejo. Aliĝiloj kaj aboniloj estu preferinde senpere sendotaj al la Adm. de SAT en Leipzig.

La Administracio de SAT

PER PROPRAJ OKULOJ

La Laboristaro ĉiulanda estis tiom multe trompata el ĉiuj flankoj, ke ĝi ofte malfacile kredas al informoj, kiuj estas disvastigataj en la publiko. Precipe strangan sorton tiurilate havas la informoj pri Sovetio, kiujn ordinare oni akceptas kun jam antaŭfiksita tendencopinio — ĉu pozitiva ĉe la amikoj, ĉu negativa ĉe la kontraŭuloj. Tial nerefuteblaj estas nur la faktoj, kiuj estas objektive konstatitaj "per propraj okuloj" de alilanduloj, persone vizitintaj Sovet-Respublikaron.

Jen do estas kelkaj faktaj opinioj de l'alilandaj esperanto-delegitoj dum la Oktobro-festoj en Sovetio. Ni publikigas nur kelkajn nemultajn fragmentojn, kiujn K-doj intertempe donis al ni. Ni esperas, ke ili interesigos la legantaron.

Jen kion diras K-do *Lerchner:*

"— La plej impona tago estis por mi la 7-a de novembro, kiam okazis la parado de la Moskva garnizono kaj la manifestado de la Laboristaro. Jam de la frua mateno marŝis la laboristaj batalionoj de la fabrikoj al la Ruĝa Placo. Pli ol unu miliono da homoj pasis antaŭ miaj okuloj. Se oni meditas pri tiu giganta manifestado, kiu daŭris ĝis la 7-a horo vespere, tiam oni konkludas, ke tia popolo, tia Laboristaro estas nevenkebla. Apartan laŭdon meritas la organizintoj de tiu grandega manifestado. Bona organizado kaj disciplino montris al mi, kiom da forto kaj pacienco kuŝas en la rusa Laboristaro..."

Laŭdante kaj aprobante, K-do *Lerchner* ne forgesas pri mankoj:

"— Dum nia ĉeesto en Moskvo ni havis la okazon viziti plurajn fabrikojn kaj kazernojn. La laboristoj en la fabrikoj faris al ni bonan impreson kaj estas tre kontentaj... Estas ja kompreneble, ke iuloke ekzistas ankoraŭ mankoj, kaj tiujn mankojn neniu laboristo provis kaŝi antaŭ ni, sed ĉiu sincere konfesis, ke ĉiu lando, kiu dum multaj jarcentoj estis malzorgata kaj subpremata, ne povas fariĝi post kelkaj jaroj senmanka paradizo..."

Ankaŭ K-do *Bässler* atentigas pri la mankoj, kiuj estas sekvoj de la objektivaj cirkonstancoj:

"— Ĉiuloke, sur ĉiuj kampoj mi devis konstati mirindan progreson. Jes, ankaŭ gravan mankon mi devis konstati en malgrandaj lokoj Minsk kaj Smolensk: foreston de la plej modernaj maŝinoj. Sed mi konscias kaj hontas: ja ni, germanaj proletoj, ne agis same, kiel la sovetia laborularo, ni permesis al niaj iamaj gvidantoj perfidi la revolucion. Do, maŝinoj el Germanio estas nun tro multekostaj, ĉar nunaj regantoj de nia "libera" respubliko liveras la maŝinojn al Sovetio nur kun granda profito."

K-do *Bässler* kontraŭmetas al tiu ĉi objektiva manko gravan avantaĝon en la kampo de la kultura laboro en Sovetio:

"— Niaj vizitoj en lernejoj, universitatoj, kluboj ktp. pruvis al mi, ke la kultura laboro en Sovetio multe superas jam la "kulturan" laboron en kapitalistaj landoj, kaj krome ĝi tute ne estas komparebla kun tiu en kapitalistaj landoj: en Sovetio porproleta, en la kapitalistaj landoj kontraŭproleta edukado..."

Multe pri la kultura vivo en Sovetio parolas K-do *Adamson:*

"— Neniam en aliaj landoj mi vidis tiel viglajn klubojn kaj kunsidojn kiel en Sovetio. La kolektiva laboro tie tre bone evoluis. Multajn bonhumorajn gelaboristojn mi ĉie renkontis. Tute novan karakterizon ili donas al la laboro: oni renkontas en ili ne plu sklavojn, sed homojn, — laboristojn, kiuj sentas, ke ili konstruas kaj laboras al si mem, same kiel por la tuto... La lernejoj ŝajnas al mi esti la plej bonaj; kaj mi estas ravita pri la rezultoj, kiujn oni atingas, instruante laŭ la novaj metodoj, kiuj nur estas eblaj en socialista ŝtato... La pentraĵarto ankaŭ montras novan freŝan vivon. Tre zorge la novaj regantoj gardis la arton malnovan, samtempe subtenante la arton inspiritan de la nova epoko en la historio de rusa popolo... Mi vidis teatron kaj tuj mi devis pensi: "Ĉu tiel realan, vere vivan teatron oni povas doni, ekzemple en Svedio? Post kiam mi vidis la novan verkon de Gladkov "Cemento" en unu el la Moskvaj teatroj, mi ofte meditis pri la eblo ĝin transporti al sveda teatro. Mi estis konvinkita, ke estas neeble ĝin doni per svedaj aktoroj, ĉar ili ja vivas en alia mondo, en la mondo de l' estinteco; ili estas tro influataj de la burĝa kulturo, kiu sin pli okupas pri sensencaĵoj ol pri grandaj problemoj... Kaj tie la arto estas por la popolo. Ŝajnas, ke la popolo kun granda apetito kaptas ĉiun eblon ĝui la teatran arton. En Svedio la teatroj ofte estas malplenaj kaj oni plendas, ke la popolo ne havas intereson. La malon mi trovis en Sovetio. Kaj tio tre ĝojigis min... En la tuta vivo de Sovetio oni rimarkas, ke tie nova tempo naskiĝis kaj ke la nova socio maturiĝas rapide, donante al la tuta popolo pli da kleriĝo, pli da kulturaj fruktoj, pli da lumo materie kaj anime kaj pli da ĝojo. La lumo venas el Oriento."

Interesan fakton konigas K-do *Lundström:* "— Inter aliaj vidindaĵoj, kiujn mi vidis dum mia dusemajna estado en Sovetio, mian atenton tre altiris la moderna, ĵus finkonstruita presejo de Moskva "Izvestija", kiun mi vizitis kun esperantista delegitaro. Pro la manko de tempo ni ne povis traviziti tutan domegon, sed jam la lokoj, kiujn ni vizitis, atestis al ni la modernecon de la presejo. La presejo tre bone montras la emon agi por la bono, por la higieno de la laboristoj. Krom la modernaj presmaŝinoj kaj iloj de preslaboro, mi povis konstati, ke la laborĉambroj estas vastaj, kun grandaj multon da lumo donantaj fenestroj. Por ĉiu laboranto ekzistas sufiĉe da spaco por senĝene labori. En la subtera etaĝo ekzistas la plej modernaj banejoj kun duŝo-aparatoj, aparte por virinoj kaj viroj. La muroj de la banejoj estas faritaj el la blanka kahelo kaj ili aspektas higienaj. Kun malĝojo mi devas konstati, ke en mia lando ĝis nun mi ne spertis tion, ke oni tiom oferas por la higieno de la laboristoj."

Avare, sed kun plena firmeco sian impreson esprimas K-do *Krastin.* Li bone konis la antaŭmilitan Rusion, li havis ion por kompari, por konstati la diferencon, progreson kaj malprogreson, — kaj li skribas: "— Miaj supozoj iĝis pravaj. Mi nun per propraj okuloj vidis la staton de Sovetio, kiu en ĉiu direkto estas multe pli bona ol dum la cara tempo, kaj mi povas certigi, ke ĝi eĉ superas nun tiun de kapitalista ŝtato. Sufiĉas nur unu rigardo je la laborularo kaj oni tuj povas rimarki la grandan diferencon..."

Ni finu nian ĝeneralan revuon per sekvanta citaĵo el impresoj de K-do *Klein,* kiu estis la plej kritikema kaj postulema inter ĉiuj delegitoj. Li ĉion penis kontroli, palpi kaj mem konvinkiĝi, tial lia juĝo estas la plej sciinda. Kaj li skribis jenon: "— Estante dek tagojn en Moskvo, mi povas diri, ke la multaj antaŭjuĝoj, kun kiuj mi venis Sovetion, tute forflugis. Jam ĉe la polrusa limo, kiam venis komandanto de la Ruĝa Armeo en la vagonon kaj nin petis sekvi lin, tiam mia koro la unuan fojon tremis, ke mi nun povos surpaŝi la Sanktan Teron Sovetian. Kaj kiam en la novkonstruita halo impona de Njegoreloje nin salutis tia amaso da gelaboristoj, gekamparanoj kaj ruĝarmeanoj, kiam eksonis la Internacio kaj ĉiuj kunkantis, tiam mi ekkonis la internan ideon de la vortoj: "Ne nulo — ĉio estu ni!" Kaj kiam venis la muzikistaro en la vagonon, ludis revoluciajn melodiojn kaj mi poste parolis kun la homoj sovetiaj, mia ĝojo kreskis tiugrade, ke mi ne povas ĝin priskribi. Kaj kion mi poste vidis kaj travivis, kiam mi aŭdis, ke tuta enhavo de Sovetio apartenas al la Ŝtato kaj tiun ŝtaton regas kaj instalas la laboristoj mem, mi ekkonis, ke tiun ŝtaton oni devas ami el la profundo de la koro, per ĉiuj nervoj kaj fortoj kaj por ĝi en la animo konstrui altaron, sur kiu flamas eterna fajro de sindono senpripensa. Kaj kiam mi staris 12 horojn sur la Ruĝa Placo kaj tie preterpaŝis la taĉmentoj de la Ruĝa Armeo, de la armita Laboristaro kaj la alia popolo, — mi eksentis: tiu popolo neniam plu tolerus la sklavoĉenojn de kapitalismo kaj imperialismo, ĝin ne povos subigi la bandaĉoj de faŝismo kaj popismo, ĝi iros firmpaŝe al sia fincelo: la unuklasa, la senklasa laborkomunumo TERO..."

Esperantista Delegitaro parolas el la Radiostacio de ruĝa Moskvo



K-do Ujaku Akita (japana delegito-literaturisto) legas sian esp-an radio-paroladon antaŭ mikrofono en Moskvo la 7-an de novembro 1927. Apude sidas K-do N. Nekrasov (Moskvo).

Ĉiuj esp-istaj delegitoj faris tre interesajn paroladojn el la radiostacio donante ne nur siajn impresojn pri Sovetio kaj la jubilea festo, sed ankaŭ transdonante salutojn de siaj K-doj el la respektivaj landoj. Parolis K-doj: *Ujaku Akita,* konata dramverkisto japana, reprezentanto de la Japan-Soveta Artoliteratura Asocio en Tokio, *Martin Klein,* redaktoro de "La Socialisto" el Vieno (Aŭstrio), *Georgo Salan* (Francio), *Richard Lerchner* (Germanio), *Frederik Sons* (Anglio), *Einar Adamson,* redaktoro de "Väst-Svenska Kuriren" kaj de "Svenska - Arbetar - Esperantisten" en Goeteborg (Svedio), *Kvandzo Nalmi* (Japanio), *Hugo Hempel* (Germanio), *Arne Lundström* (Finnlando), *Rosa Marthinsen* (Norvegio), *Antonio Krastin* (Latvio), *Otto Bässler* (Germanio).

IMPRESOJ PRI SOVETIO

de okulvidinto, orelaŭdinto, fingrotuŝinto

Tiujn ĉi notojn mi dediĉas al Ŝura D., por ke ŝi aktiviĝu.

La 28-an de oktobro 1927-a, vespere je la 21-a h. eksterordinara homsvarmado estis rimarkebla en Pariz-a Nordstacidomo. Jam de kelkaj tagoj "l' Humanité" anoncis, ke ĉi vespere, je la 22-a h., ekveturos la dua francia delegitaro al Sovetio por partopreni la 10-an jubileon de l' Oktobra Revolucio. Kaj multnombraj estis tiuj, kiuj sin trovis ĉi tie por manpremi K-dojn, akompani amikon aŭ nur envie rigardi la forveturontojn. Staras jam la vagonaro sur la reloj. Unu post la alia alvenas la delegitoj kunportante pezajn pakaĵojn. Kiel vidindulojn akceptas ilin la K-daro, kaj iom fiere ili marŝas al sia vagono. Estas flustrataj nomoj de famuloj: Colomer, tre konata anarĥiisto, Grandjouan, revolucia desegnisto, kiu jam antaŭ kelkaj monatoj verkis raportlibron arte ilustritan pri Sovetio. Invitita de SEU viziti Proletan Ŝtaton okaze de l' datreveno, mi veturos kune kun la delegitaro kaj jam troviĝas sur la kajo. Akompanas min fidela amiko, K-do Glodeau, unu el la plej konataj kaj sindonemaj revoluci-esperantistoj el Francio.

Sur la kajo formiĝis grupo, kaj ŝajne io aparte atentinda estas meze de l' grupo, ĉar sin premas la K-doj unu al la alia, dum alkuras senĉese aliaj scivolemuloj. Ni alproksimiĝas kaj tuj rekonas mian K-don Achille le Roy. Ĉiuj parizaj laboristoj bonkonas tiun 87-jaraĝulon: li estas ja unu el la malmultaj komunumanoj ankoraŭ postvivantaj. Arda li estas kiel junulo, kaj ĝojege li akceptis la inviton de Maljunaj Bolŝevikoj veturi Sovetion, por tie konstati ĉu Oktobra Komunumo estas inda ido de Pariza Komunumo. Nun li sidas sur pakaĵo, kaj rakontas al la aŭskultantoj pri revoluciaj okazoj de li travivitaj.

Sed jam estas tempo envagoniĝi. Sin interkisas la gekunuloj, manpremas la amikoj, dum ĉiuj ĉeestantoj ĉion bonan eldiras. Aparte emociigaj estas tiuj ĉi lastaj minutoj. Senkonscie mi fratkisas Glodeau. Subitaj flamoj: fotografistoj amuziĝas. Ekmoviĝas la vagonaro. Batas la 22-a h.. La tuta kajo estas "superkamaradigita". Multnombraj voĉoj aŭdiĝas: Sovetojn! Sovetojn! Colomer plurfoje ekkrias: Vivu Revolucio! Eksonas Internacio! Komenciĝis la Vojaĝo!!

Rapide veturas la vagonaro. Estas nokto. Interkonatiĝas la delegitoj. Kvar kupeojn ni okupas, ni estas 27. Kamparana kaj junlaborista delegitaroj enhavas preskaŭ ĉiujn K-dojn. Krome sin trovas nur kelkaj izoluloj kiel la komunumano, la anarĥiisto, la desegnisto kaj la SAT-ano. Vigla interparolado kunigas nin. Kvazaŭ ebriaj aspektas kelkaj. Brilaj estas ĉies okuloj, ĉiuj samtempe provas ion aŭdigi. Tiu juna K-dino, kamparanino, rakontas, ke en sia vilaĝo en Alparo, nur ŝia fratino kaj ŝi aniĝas al Kompartio. Malfacile kaj eĉ danĝere estas propagandi revoluciajn ideojn inter ŝiaj samvilaĝanoj: ili estas di-kredantoj kaj kutimas tradicie obei la pastron. Tiu ĉi sin krucosignas, kiam li preterpasas la domon, kie loĝas la komunistinoj. Akra estas la laboro, sed esper- kaj kuraĝplena estas la koro de l' ruĝa kamparanino. En Sovetio, diras ŝi, mi ellernos plej bonan rimedon por atingi la celon, por sukcese fosi la sulkon.

Junlaboristo, senpartiano, delegito de l' pariza konstrusindikato, diras sian ĝojon fine havi eblon viziti proletan ŝtaton. Tion li ege deziris dekiam li laboras, sed kvazaŭ senespere. Ĉiuj liaj kunlaborantoj ja tion ankaŭ, tiel arde, kiel li sopiris, kaj bedaŭrinde ne ĉiuj povos realigi tiun ĉiaman revon. Fine li estis delegita. Kiom envie rigardis al li la aliaj, kiom da demandoj ili komisiis al li! Ĉu li povos ĉion plenumi?

Same parolas ĉiuj delegitoj. La tuta vagono tremas pro intima emocio. Mi vizitas Colomer. Li ne partoprenas la ĝeneralan interparoladon; li sidas en kupeo kaj pripensas. Grave malsana li estas kaj precipe por li terure laciga estos la vojaĝo. Al mia demando li respondas: "la franciaj anarĥiistoj sendube ne komprenos min. Longan tempon mi akre kritikis anarĥi-vidpunkte sovetan ŝtaton, kaj tiu teoria kritiko estis tre ŝatata de miaj K-doj. Sed jam antaŭ du jaroj mi ekkonsciis, ke Proletaron principa diskutado ne interesas. Faktojn ĝi postulas. Kio estas ĉefa por ĝi, tio ne estas ĉu Bakunin aŭ Lenin pravas, sed ĉu sovetia Laboristaro vere liberiĝis. Tiun enketon mem mi volas entrepreni. Malsana mi estas, sed ne gravas mia sano — pli gravas la veron atingi." Mi aŭdas lian absolute sinceran akcentmanieron, rigardas liajn flamajn okulojn, maldikan vizaĝon, ostajn manojn, mi rememoras, ke dum la lasta tutmonda interbuĉado li — preskaŭ sole — rifuzis sian servon al francia burĝaro, kaj naŭzas min, ke jam kelkaj kuraĝis flustri: Colomer estas subaĉetita . . .

Dume rapide kuras la radoj sur la reloj, malhela nokto envolvas la vagonaron. Francia policisto petas pasportojn kaj notas niajn nomojn, profesiojn kaj loĝurbojn. Baldaŭ ni alveturos Belgion. La K-doj ekpretigas siajn lokojn. En nia kupeo — okloka — ni estas ok, kvar sur ĉiu benko. Feliĉe singardemaj K-doj lasis en stacidomo kusenojn kaj kovrilojn, dank' al kiuj ni sufiĉe oportune sidas. Ni alvenis en Erquelinnes (belgia limstacio). Unua doganrevizio. Sen bedaŭroj Francion ni forlasis. Ĉar dormi mi tute ne kapablas, mi tralegas ABC de Sennaciismo.

26. oktobro. — 7-a matene. Ni alveturas en Aachen (Aix-la-Chapelle). Duan fojon ni devas montri la pasportojn kaj lasi traserĉi la pakaĵojn. Bela estas la vetero, la ebenan kamparon varmigas la suno. La K-doj staras en vagonkoridoro, la nazo ĉe la fenestropordo, kaj vane serĉas diferencon inter germania kaj francia tero. Baldaŭ ni atingas Köln; tra la vitra stacidomtegmento ni provas ekvidi la faman katedralon. Tuj poste ni traveturas ponton super Rejno, kaj mire trafas niaj okuloj ambaŭflanke de l' ponto statuon de Vilhelmo la II-a. Ĉu do la socialista revolucio 1918-a eĉ ne sukcesis imperiestrajn statuojn en-Rejndronigi?

Nun ni jam troviĝas en Ruhr-regiono. Alte staras la kamentuboj sur la ĉielo, nigraj estas la urboj. Jen Düsseldorf. Kelkminuta halto. K-doj ekkantas Internacion. Nur kelkaj burĝoj promenas sur kajo kaj rigardadas nin. Alvenas kontrolisto, kiu diras: "En Germanio oni rajtas kanti, sed ne aŭdigi sian kanton". Tio sendube signifas, ke ni devas kanti per fermita buŝo...

Jen Essen, Dortmund, — prezentiĝas al mia memoro la vizaĝoj de K-doj Sterzenbach kaj von der Heid kun kiuj mi konatiĝis dum Lyon-a kongreso. Bedaŭrinde mi ne havis eblon informi ilin pri nia trairo, kaj nur indiferentajn kapojn mi vidas en tiuj ĉi stacidomoj.

Nun, ambaŭflanke de l' vojo, kuras larĝa ebenaĵa rubando. Sinsekvas arbaretoj, legom- kaj grenkampoj, herbejoj. Rimarkigas unu kamparana delegito, ke preskaŭ ĉiuj bovinoj paŝtiĝantaj sur herbejoj estas nigraj kun blankaj makuloj. Kiel parizaj elegantulinoj ili aspektas. En lia regiono, li diras, estas nur flavruĝaj bovinoj kaj li esprimas opinion, ke inter Germanio kaj Francio estas nur bovina diferenco. Li ankaŭ rimarkas, ke neniulo estas videbla sur tuta kamparo; same en stacidomoj. Ĉu do tuta germania popolo laboras en fabrikoj?

Je la 18-a ni alveturas en Berlin-Friedrichstrasse. Berlinaj K-doj atendas nin kaj siajn servojn proponas. Sed nur gepatran lingvon ili scipovas kaj neniu el ni sufiĉe posedas la germanan lingvon. Sekve ni tute ne sukcesas interkompreniĝi. La unuan fojon delegitoj spertas malfacilaĵojn de lingva diverseco. Tiuj ĉi malfacilaĵoj — ĉiutage pligrandiĝontaj — preparas bonan grundon por nia propagando. Colomer etendas la manon al mi kaj laŭtdiras: "Jen tiu, kiu solvis la problemon. Ankoraŭ kelkaj tiaj okazoj kaj nia afero glatiĝos."

Nokto. Senĉesa veturado. En ĉiuj kupeoj aŭdiĝas vigla babilado. Grandjouan iras de kupeo al alia kaj ĉiujn stimulas. Li tradukis francilingven la faman rusian kanton pri Stephan Razin, kaj varmvoĉe kantas ĝin. Je la 21.30-a h. ni alvenas en Stentsch, germania limstacio. La trian fojon ni devas montri pasportojn kaj valizojn. Jam tedas nin tiu devigo. Baldaŭ ni estas en polia limstacio. Denove pasportoj, denove pakaĵoj. For la landlimojn!...

Pasintan nokton ne dormis la K-doj, multaj sentas nun emon ripozi. Sed kiamaniere ripozi, kiam oni sidas ok en unu kupeo? Kelkaj decidas dormi surplanke.

La tutan nokton polaj soldatoj, kun pafiloj, deĵoras en nia vagono.

27. oktobro. — Je la 7-a h., en Lodz, la K-doj, kiuj pasigis la nokton surplanke konstatas, ke dum ili dormis oni fortranĉis iliajn poŝojn. En la fortranĉitaj poŝoj troviĝis monujoj kaj paperujetoj. Ĉu la gardsoldatoj? Tiel lertajn ŝtelistojn ni neniam renkontis en Francio. Memorinda vojaĝimpreso!

Envagoniĝas maljuna sinjorino (ŝi aspektas kiel burĝa judino), kun kiu mi preskaŭ tuj konatiĝas. Mian SAT-insignon ŝi rimarkis kaj ekparolis al mi pri Zamenhof. Ŝi loĝas en Grodno, iniciatinton

E. IZGUR
NUR VOLU!
La festo de laboro kaj paco
Unuamaja kanto de ribelo
Eldono dua, reviziita kaj ilustrita
Prezo: 0,70 mk. g.
Mendu ĉe Administracio de SAT
Rich. Lerchner, Leipzig O 27
Colmstr. 1 (Germ.)

de esperanto persone bonkonis. "Li estis tiel bona kaj modesta. Oni opiniis, ke li estis freneza..."

La kamparanaj delegitoj tute ne interesiĝas pri vivo de Zamenhof. Ĉe la fenestroj ili kun avidaj okuloj rigardas la panoramon. Kio pleje mirigas ilin estas, ke landoj kaj homoj tiel similas unuj la aliajn tra ĉiuj limoj. Tamen jam estas videblaj diversaj aĵoj ne kutimaj por francianoj: sur la kampoj staras pajlodometoj kaj sur la kotplenaj vojetoj iras mezepokaj ĉaroj. Multnombraj estas la batalkampoj; de tempo al tempo la okuloj renkontas batalarbaretojn, kies ora foliaro flamigas la malaltan ĉielon.

Je la 9-a ni estas en Varsovia stacidomo. Atendas nin K-dino, pri kiu mi ne parolos, ĉar spionas en Polio tro multe da "malamikaj oreloj".

Je la 13-a h., en Bialistoko tro da kamentuboj. Malbele aspektas la esperanta naskurbiĝo. Fumo kaj koto. Zamenhof-an memoron mi salutas. Sed mi devas konfesi, ke mi tute ne estas emociigita.

Jam komencas senpacienciĝi la delegitaro. Estas anoncite, ke je la 21-a h. ni transiros polian limon. Sidi en kupeoj ni ne plu kapablas. Ni staras en koridoroj kaj interbabilas. Je kioma horo ni atingos la limon? Nur tio interesas nin. Iu diras, ke jam li flaras bonodoron de ruĝa tero, kaj ekkantas. Baldaŭ ni ĉiuj kantas. Internacio, Revolucio, Karmanjolo, Juna Gvardio, Bandiera Rossa sonas en tuta vagono. Sed kantoj ne pli rapidigis la vagonaron. Denove mi sidiĝas. Apud mi estas Colomer, li diras al mi: "Tiel kanti estas malbone: oni ebriiĝas kaj poste ne plu kapablas serioze enketi. Certe min ankaŭ profunde kortuŝas la proksimeco de sovetia limo, sed tiun emociiĝon ni devas kontraŭbatali. Ni bezonas nian tutan vidklarecon por nia laboro." Interrompas nian konversacion servistino, kiu balaas sub niaj kruroj. Tre indignita ŝi estas, ĉar malpura estas la kupeo, kaj ŝi insultas nin pole. Konfesu ni, ke ŝi tute pravas. En Francio ne ekzistas tiuj vagonpurigistinoj kaj ĉiuj vojaĝantoj kutimas ĵeti planken ĉion, kio ĝenas ilin. Cetere ni jam konstatis, ke tiu ĉi vagonaro estas plurpunkte pli oportune aranĝita ol la franciaj. Ekz.: en ĉiu kupeo estas cindrujoj, kraĉujo, rubkesteto, apogtableto, vesthokoj; — nenio simila en franciaj triaklasvagonoj. Ni same rimarkis, ke en Germanio kaj Polio la biletkontrolo estas multe pli severa ol en Francio. Ĉiuj, kiuj vojaĝis en Francio scias, ke relative ofte oni povas traveturi tutan Francion ne trafite de kontrolisto. En Germanio kaj Polio deĵoras konstante unu kontrolisto en vagonaro. Tuj kiam vagonaro forveturas el stacidomo, tiu kontrolisto petas biletojn de la ĵus envagoniĝintoj. Ŝajne tre malfacile estas "lepore" vojaĝi en tiaj kondiĉoj.

Fine, je la 19.30-a h., ni troviĝas en Stolpce, pola limstacio. La kvinan fojon: pasportoj kaj pakaĵoj. Pacienciĝu, K-doj! baldaŭ ni estos hejme... Polaj soldatoj kaj oficiroj envagoniĝas. Ili akompanos nin ĝis la limo. La premsento kiu kuŝas en ni depost kiam ni veturas tra Polio plipeziĝas. Iu el ni memoras, ke antaŭ ĉ. du jaroj kaj duono, en tiu sama regiono, du polaj oficiroj, unue mortkondamnitaj pro ilia revoluciemo, kiujn oni veturigis al la limo por tie interŝanĝi ilin kontraŭ polaj spionoj arestitaj en Sovetio, estis mortigitaj de la policistoj kondukantaj ilin.

Sed nia entuziasmo estas pli forta ol nia premo. Tiel proksima estas la celo! Ni ekkantas Junan Gvardion. Venas oficiro, li atentigas nin, ke ni estas ankoraŭ sur pola teritorio. Sed jam anoncis K-do, ke ruĝa stelo estas videbla. Kun duono de l' korpo el la vagono, ni avide esploras la nokton. Jes, jen ĝi la Ruĝa Stelo. Nigra estas la nokto. Eĉ unu ĉiela stelo ne estas ekvidebla. Sovetia stelo triumfas en tutĉiel'!

Post kelkaj minutoj — estas precize la 21.12 — haltas la vagonaro sub modesta triumfarko, kies supra parto estas ekrano sur kiu ruslingva surskribo estas legebla. Tiu surskribo, laŭ diro de K-do, signifas: Ĉiulandaj proletoj unuiĝu vin! Supre de l' ekrano radiadas la stelo.

Elvagoniĝas pola soldataro, envagoniĝas ruĝarmeanoj. Netradukebla estas ĉies ĝojo. Atingita estas la celo de l' sopiroj de tutmonda Laboristaro. *Ni troviĝas en Sovetio!*

Kaj ree veturas la vagonaro por baldaŭ trafi limstacion Negorelojo. Ni estas tie akceptataj de l' loka akceptkomitato en stacisalonego, kie atendas nin amasa kunveno de gelaboristoj kaj ruĝarmeanoj. Refoje spertas la delegitoj la terurajn malfacilaĵojn de lingvdiverseco. De nun tiu sperto fariĝos ĉiuminuta kaj mi havos konstantan okazon profite propagandi. Post unu horo ni denove envagoniĝas por rekte veturi al Moskvo tra Minsk, Smolensk, Vjasma.

Sekvantan matenon, kiam mi vekiĝas, ni jam traveturis Smolensk, kaj tuj alveturos al Vjasma. Mi rigardas la kamparon. Sinsekvas ebenaj kaj marĉaj terspacoj, kie staras pajlokovritaj domoj, ĉevaloj, bovinoj, nigraj porkoj. Bela estas vetero, tute ne frostas. Sur kotaj vojetoj antaŭeniras tiaj samaj ĉaroj, kiajn ni jam vidis en Polio. Sur la ĉaroj sidas tipaj kamparanoj, kiuj ne aspektas tute puraj.

Ankoraŭ kelkajn horojn, kaj je la 14.30 ni salutas Moskvon — la — Ruĝan. Neniu el ni sentas sin laca, rapide ni saltas el la vagono kaj trovas nin meze de densa laboristamaso. Mi renkontas K-don Lidin kaj ĝoje interkonatiĝas kun li. Ni marŝas kelkajn paŝojn kaj estas akceptataj de longdaŭra aplaŭdado de la laboristoj, kiuj plenigas la placon antaŭ la stacidomo ĉe la monumento de Lenin. Pluvas. Tuj okazas akcepto, kiun partoprenas ĉ. deko da oratoroj. Post ĉies parolado muzikistaro ludas rekantaĵon de Internacio. Estas ŝajne kutimo ĝenerale respektata en tuta Sovetio, ĉar okazis same dum ĉiuj akceptoj, kiujn mi ĉeestis. Mi konfesu, ke tiun kutimon mi ofte malbenis. Sendube tiun tagon Colomer ankaŭ aparte ĝin malbenis: li ja staris sur la placo, kolektiĝis la pluvo sur la larĝaj randoj de lia ĉapelo kaj poste fluis sur lian vizaĝon kiel el krano. Sed li ne moviĝis kaj tute aspektis kiel sanktulo, kiel ŝtona sanktulo. Fine oni liberigis nin, ni enaŭtobusiĝis kaj rekte veturis al hotelo.

G. Salan.

La partoprenado de l' virino en la socia vivo

La partoprenado de l'virino en la socia vivo ĉiam pligrandiĝas. En Germanio, ekzemple, en la jaro 1923 estis 193 kuracistinoj nuntempe 1 637. En la universitatoj, la nombro da studentinoj pligrandiĝis de 4100 en la jaro 1914 ĝis 7 159; en la teknikaj lernejoj de 62 al 471. En la jaro 1920 kun enloĝantaro de 60 000 000 Germanio kalkulis 500 000 da virinoj okupataj en la komerco, industrio, ktp., dum Usono, ekzemple, por ĝiaj 110 000 000 da loĝantoj nur 8 500 000.

Tiu ĉi pligrandiĝo de l' nombro de virinoj okupataj de la pagata laboro estas la sekvo de l' malriĉiĝo de l' malgranda burĝaro kaj de laboristoj. Kaj tiel la kapitalista sistemo pli kaj pli forprenas la virinon de ŝia hejmo kaj infanoj.

Kion signifas antaŭ tiu ĉi brutala fakto la ripetadoj de l' burĝoj, kiuj sin prezentas kiel la protektantoj de l' familio kaj de l' hejmo? Hipokritaĵon!

La kapitalismo prenanta la virinon for de la malnovaj formoj de l' familia laboro, premanta ŝin sub la duoblan jugon de tiu laboro kaj de tiu de l' societo, metas samtempe la virinon en kondiĉojn, kiuj favorigas ŝian batalon por la politika kaj sociala liberigo.

Elfrancigis el "Le Drapeau Rouge" (La Ruĝa Flago) *"Al Vereco"*.



Sendu la konton al Bavin!

Antaŭ kelka tempo ĉ. dudek maldungitoj eniris la grandan kafejon de la Sydney-a stacidomo, kiu estas ŝtata entrepreno, sidiĝis ĉiu aparte ĉe diversaj tabloj kaj mendis al si bonajn — manĝaĵojn. Satiĝinte, je komando de unu el ili forlasis subite la kafejon kun la elkrio: Sendu la konton al Bavin! Bavin estas ja ministro de Laboro. Oni diras, ke nur unu "gasto" ĝis nun estis arestita.

*

Antaŭan tagon okazis ankaŭ aventuro en la parlamento. Kiam deputito Forster leviĝis por paroli, iu viro el la publika galerio ekkriis "laboron!, ni, maldungitoj postulas laboron". Lin sekvis la aliaj kaj la tuta galerio kriadis.

Ankoraŭ longe okazis la aventuro, la enirintaj policanoj ne povis rapide forigi ĉiujn manifestintojn.

A. Gr. (SAT-ano 9625).

Ĉe la Adm. de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27, estas havebla

la unua volumo de

LA MIZERULOJ

la majstroverko de la genia aŭtoro Victor Hugo, esp-igita de *Centezimala*.

"La Mizeruloj" estas verko, kiu enhavas serion da ĉiuspecaj sociaj dramoj, skizitaj de l' artisma mano de filozofia romanpoeto; ĝi estas
verko, el kiu ĉiu frazo enhavas pensigan penson;
verko senfine diversa laŭ enhavo kaj brilanta laŭ stilo;
verko, kiu abundas de kortuŝantaj, neforgeseblaj scenoj de granda tragedia forto kaj prenitaj el la realeco;
verko, kiu prezentas trezoron de filozofiaj meditoj pri homoj kaj pri aferoj, kaj kiu enhavas ĉiujn literaturajn formojn de la idilio ĝis la epopeo;
verko, fine, de nesuperebla beleco, kiun oni ne nur kuntrenate tralegas, ĵetate de unu emocio en alian — sed kiun oni centfoje relegos ĉiam trovante novajn belaĵojn.

La prezo de ĉi tiu 248-paĝa volumo estas nur 1.20 g. mk. inkluzive afrankon. Mendu do senprokraste!

8-a Kongreso de SAT
en Göteborg (Svedio)

(14—19. aŭgusto 1928)

Ĉion rilatan al la kongreso adresu al: Einar Adamson, Box 73, Göteborg, Svedio.

2-a Komuniko

Fak-kunsidoj. Ni alvokas fakestrojn rilati kun la komitato por prizorgi specialajn kunsidojn; ekz. de liberpensuloj, kooperativanoj, radiistoj, sportuloj, fervojistoj, poŝtistoj, telegrafistoj, instruistoj, ĵurnalistoj, poligrafistoj, studentoj ktp.

Proponu, se vi havas deziron organizi ian fakan kunvenon.

Kamaradoj! Ni petas vin, bonvolu iom post iom en vialandaj gazetoj presigi notojn aŭ artikolojn pri nia 8-a. Sendu la gazetnumerojn al la komitato.

Por sovetlandaj Kamaradoj

Kamaradoj el Moskvo, Leningrad kaj norda Rusio veturas plej bone kaj plej rapide tra Finnlando. Per vaporŝipo el Helsinki al Stockholm, aŭ — se eble — per vaporŝipo el Leningrado al Stokholmo. El Stokholmo al Göteborg vi veturas aŭ dumnokte dek horojn aŭ per taga elektra rapidvagonaro 7 horojn. La ordinaraj biletprezoj estas 19,80 Kr. svedaj, proksimume 10 rubloj. Sed se oni aranĝos komunan veturon de minimume 30 personoj, ni povos ricevi 25% je la prezo, do la bileto kostos nur 13,50 sv. Kr. (ĉ. 7 rubloj). Ni do proponas al SEU pritrakti la demandon pri eventuala komuna vojaĝo, difinu la tempon por la veturo el Leningrad tiamaniere, ke Kamaradoj partoprenontaj komunan vojaĝon povu sin pretigi en taŭga tempo.

Por Kamaradoj el Mezeŭropo

Legu la supran alvokon. Se vi povas fari similajn vojaĝojn, ekzemple el Berlino kiel centra punkto, ĝis Trelleborg (la sveda limstacio) ni ankaŭ povas ricevi la saman rabaton je la biletoj inter Trelleborg-Göteborg. En Svedio la vojaĝoficejo de Ŝtataj Fervojoj promesis organizi por ni tiujn vojaĝojn. Eble ili aranĝos tiel, ke eksterlandaj karavanoj ricevos specialajn vagonojn. K-doj, kiuj volas veturi grupe el diversaj punktoj, — ekzemple Minsk, Varsovio, Riga, Prag, Vieno, Budapesto, Parizo, Berlino, Leipzig, bonvolu informi la kongresan komitaton.

Estlandanoj plej bone veturos per vaporŝipo el Reval al Stokholmo kaj per vagonaro el Stokholmo al Göteborg.

Ni komunikos baldaŭ pri horaro kaj prezoj.

La 1-a listo de aliĝintoj:

1. K-do Einar Adamson, Göteborg, Svedio 902
2. K-dino Elma Adamson, Göteborg, Svedio 9966
3. K-do Anton Norling, Göteborg, Svedio 2506
4. K-do Geo Teterin, Leningrad, USSR 1473
5. K-dino Zinaida Semjonova, Leningrad, USSR 5542
6. K-do Simeono Podkaminer, Leningrad, USSR 1679

7. K-dino Rosa Tartinsen, Oslo, Norvegio . . . .
8. K-do Fumio Oka, Kobe, Japanio
9. K-do Sumilov, Leningrad, USSR 7755
10. K-do Antonio Krastin, Riga, Latvio 3684
11. K-dino Alvine Erlich, Riga, Latvio 5806
12. K-dino Anno E. Pipkina, Moskva, USSR . . . .
13. K-do F. A. Filippov, Moskva, USSR
14. K-do Otto Bässler, Leipzig C I Germanio 715
15. K-dino Frida Bässler, Leipzig C I Germanio 2276
16. K-do N. V. Nekrasov, Moskva USSR 1520
17. K-dino Sonjo Vimenic, Moskva USSR . . . .
18. K-do Jv. Lidin, Moskva, USSR . 41
19. K-do Romano Nikolskij, Smolensk, USSR 5241
20. K-dino Anna Nikolskaja, Smolensk, USSR 6798
21. K-dino Injo Ivanova, Smolensk, USSR . . . .
22. K-do Jan Klys, Minsk, Blankrusio 4100
23. K-do Paulo Kirjuŝin, Minsk, Blankrusio 4424
24. K-dino Ada Klys, Minsk, Blankrusio 5056
25. K-do Dim. Snejko, Minsk, Blankrusio 603
26. K-do Rajhert Henrik, Minsk, Blankrusio . . . .
27. K-do Percev Fedor, Minsk, Blankrusio . . . .
28. K-do Herbert Muravkin, Berlin, Germanio 2991
29. K-dino Sofio Muravkin, Berlin, Germanio . . . .
30. K-do K. G. Karlsson, Göteborg, Svedio 212
31. K-do E. Lanty, Paris 1
32. K-dino E. K. Limouzin, Paris . . 509

Pri programo de SAT

Al la membroj de la komisiono. — Aldone al la informo en "S-ulo", n-o 166 (1927), mi petas, ke la membroj liveru siajn sugestojn, rimarkojn kaj pozitivajn aldonojn al la skizo de SAT-programo ĝis la 1-a de februaro 1928. Ni bezonas sufiĉan intertempon antaŭ la kongreso por multobligi ĉiujn proponojn kaj dissendi al la komisionanoj, ricevi ilin kun fin-aldonoj kaj denove dissendi por voĉdonado kaj posta publikigo en "S-ulo".

La adresojn de K-doj Salan kaj Platiel mi ricevis. Dankon!

H. Muravkin, sekr., Berlin-Chbg. 4, Wielandstr. 11, Germanio.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

Polio. La 25-an finiĝis la kurso ĉe la Liberpensula Asocio en *Lodz*. La kurson finis 12 p. Jam organiziĝis du novaj kursoj por jud- kaj germanlingvaj K-doj. Ĉi tiea biblioteko de la Liberpensula Asocio enhavas multajn esp-aĵojn, ĉiujn preskaŭ SAT-librojn. Ankaŭ en la laborista librejo "Ksigrika" estas riceveblaj ĉiuj SAT-eldonaĵoj. — **Sovetio.** En *Dnepropetrovsk* vigliĝas la movado, precipe ĉe la komjunularo. Ĉe la kultura laborĉambro de Distrikta Intersindikata Konsilantaro funkcias "Esp-o-konsultejo", kiu donas ĉiujn informojn pri esp-a interkorespondado ktp. La gazetaro estas tre favora. En *Kalac* fondiĝas esp-o-rondeto. —

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo":

Majak Kommuny, Sebastopol, 6. 8. 27: Letero de Sacco k. Vanzetti. — 10. 8. 27: artikolo de Lanty. — *Krasnij Cernomorec*, Sebastopol, 29. 7. 27: Sub jugo de orkolumaj sinjoroj. —

Enhavas priesperantajn artikolojn:

Le Cri Populaire de l' Oise, Creil: 20. 11. 27, 27. 11. 27. — *Le Travailleur*, Chartres: 22. 10. 27. — *L'Emancipateur*, Bourges: 9. 10. 27, 16. 10. 27, 23. 10. 27, 27. 11. 27. — *Le Syndiqué du Centre*, Bourges: oktobro 27, novembro 27. — *La Dépêche*, Tours: 31. 10, 27, 8. 11. 27, 24. 11. 27. — *Le Populaire*, Paris: 10. 10. 27, 17. 10. 27, 24. 10. 27. — *L'Unité*, Chatellerault: 15. 10. 27. — *Bulletin d' Information de l' ITF*, Amsterdam: decembro 27. *Majak Kommuny*, Sebastopol: 11. 11. 27. —

Enhavis tradukaĵojn el esperantaj leteroj:

Majak Kommuny, Sebastopol: 9. 7. 27, 13. 7. 27, 28. 7. 27, 3. 9. 27, 24. 9. 27, 11. 10. 27, 29. 10. 27, 30. 10. 27, 2. 11. 27, 5. 11. 27, 20. 11. 27, 3. 12. 27. — *Krasnij Cernomorec*, Sebastopol, 14. 7. 27, 22. 7. 27, 28. 7. 27, 7. 11. 27, 10. 11. 27. — *Zvezda*, Dnepropetrovsk, 7. 11. 27. — *Majbutnja Zmina*, 7. 11. 27. — *Sächsische Arbeiter-Zeitung*, Leipzig, 24. 12. 27.

TARIFO DE JARABONO AL "SENNACIULO"

Ĉiu abonanto ricevas senpage "LA LERNANTO"-n

(La nombroj kiuj tuj sekvas la landnomon montras la abonprezon por membroj de SAT, — la nombroj inter krampoj montras la abonprezon por ne-membroj.)

Argentino 5 pes. (6); Aŭstrio 10 ŝil. (12); Belgio 10 belgo (12); Brazilio 15 milr. (18); Britio 8 ŝil. (9); Bulgario 200 lev. (250); Ĉekoslovakio 50 kr. (60); Danio 8 kr. (10); Estonio 700 mk. (800); Finnlando 70 mk. (80); Francio 35 fr. fr. (40); Germanio 8 mk. (9); Hispanio 10 pes. (12); Hungario, 8 pengo (10); Italio 40 lir. (45); Japanio 4 jen. (5); Jugoslavio 100 din. (120); Latvio 8 lat. (10); Litovio 15 lid. (20); Nederlando 5 guld. (6); Norvegio 8 kr. (9); Polio 12 zl. (15); Portugalio 35 esk. (40); Rumanio 300 lej. (350); Sovet-Unio 4 rubl. (4.50); Svedio 8 kr. (9); Svisio 10 fr. sv. (12); Usono 2 dol. (2.50).

Tarifo por anoncoj

Grandaj anoncoj: unu enpreso po kvadrat-centimetro kostas 0.12 mk. g.
Korespondanoncoj: unu enpreso, simpla, trilinia anonco kostas 0.50 mk. g.
Anoncoj en jarlibro: la prezoj estas la duoblaj de tiuj por "Sennaciulo".

TARIFO DE JARABONO AL "SENNACIECA REVUO"

(La nombroj kiuj tuj sekvas la landnomon montras la abonprezon por membroj de SAT, — la nombroj inter krampoj montras la abonprezon por ne-membroj.)

Argentino 2 pes. (3); Aŭstrio 4 ŝil. (5); Belgio 3 belgo (4); Brazilio 5 milr. (7); Britio 3 ŝil. (4); Bulgario 100 lev. (150); Ĉekoslovakio 20 kr. (25); Danio 3 kr. (4); Estonio 250 mk. (300); Finnlando 25 mk. (30); Francio 15 fr. fr. (18); Germanio 3 mk. (4); Hispanio 4 pes. (5); Hungario 4 pengo (5); Italio 15 lir. (20); Japanio 2 jen. (2.50); Jugoslavio 40 din. (45); Latvio 3 lat. (4); Litovio 6 lid. (8); Nederlando 2 guld. (2.50); Norvegio 3 kr. (4); Polio 5 zl. (7); Portugalio 12 esk. (15); Rumanio 120 lej. (150); Sovetio 1.50 rubl. (2); Svedio 3 kr. (4); Svisio 4 fr. sv. (5); Usono 1 dol. (1.50).

RICHARD LERCHNER, COLMSTRASSE 1, LEIPZIG-O-27 (GERMANIO)

Pagu prefere per ŝtataj monbiletoj en registrita letero. — La germanianoj pagu al poŝtĉeka konto de la Administranto n-o 6835.

Monata Esperanta Gazeto

Esperanto en Nipponlando

Bone redaktata kaj bone ilustrita gazeto en Japanio.

Jarabono: 15 s.m., 3.75 sv. fr. aŭ 15 resp-kuponoj.

Petu provnumeron (por unu resp.-kup.)!

Eldonejo:
KOKUSAIGO-KENKJŬ-ŜA
Motozono-ĉo, Kôjimaĉi
Tokio (Nippon)

ENHAVO:

Alilanda Delegitaro Esperantista en Sovetio . . . . pĝ. 113
Internacia Konferenco pri Laborista Korespondado . . . . . . „ 114
Rezolucioj ĉe la Konferenco . . . „ 115
Esperanto ĉe la mondkongreso de l' amikoj de Sovetio . . . . . „ 116
Per propraj okuloj . . . . „ 118
Esperantista Delegitaro parolas el la Radiostacio de ruĝa Moskvo „ 119
Impresoj pri Sovetio . . . . . . „ 119
La partoprenado de l' virino en la socia vivo . . . . „ 121
Sendu la konton al Bavin! . . . . „ 121
8-a Kongreso de SAT . . . . . „ 121
Pri programo de SAT . . . . . „ 122
Tra la movado . . . . „ 122
Memornoto . . . . „ 122
Anoncoj . . . . „ 122

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)